DEC/84


INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO - LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República, 54 - 29 andar - Tel. 232-6309 20.211 - RIO DE JANEIRO - BRASIL



IMPRESSO







LA "INSTITUCIO" SYLLA CHAVES

En nia lando, ekzistas diversaj institucioj kies agado eten diĝas al la tuta Brazilo kaj eĉ eksterlanden. Tiaj estas BEL, KKE, BKE, BEJO, Eldonejo Fonto, Spiritista Societo F.V. Lorenz kaj aliaj.

Sed, ekde 1980, aperis sur tiu scenejo nova "institucio", no me Sylla Chaves. De tiam, li, tutsola, per sia intelekta kaj el dona laboro, produktis sennombrajn esperantaĵojn, riĉigante nian kulturon. Estis lernolibroj, informmaterialo, porinfana lite raturaĵo, diskoj, kasedoj ktp ...

Kaj, ĝuste nun, en decembro, aperis lia plej nova produktaĵo: temis pri la disko LA BUFO.

Laŭ li, "finfine, post kvin jaroj da laboro, kompletiĝis la didaktika disko-kolekto de Sylla Chaves. La tuto konsistas el 36 kantoj - originalaj kaj folkloraj - kun vortoj elektitaj por la rapida progresado de la gelernantoj. Tri DIDAKTIKAJ KANTAROJ havas po 12 partiturojn, kun indiko de la vortoj uzataj. La sepa kaj lasta disketo ĵus aperis: LA BUFO. Ne gravas via instrumetodo. Aldonu al ĝi ĉi tiujn kantojn, kaj amuziĝu. Kantu kaj lernu!"

Unu disketo kostas, por Brazilo, Cr\$ 3.000 (ĝis 31/12/84)kaj US\$ 1.50 por eksterlando.

1980 - La alfabeto de Esperanto

1980 - Kantu kaj lemu l

1981 - Estis pli bona tempo

1983 - Kantu kaj lemu 2

1984 - Paco, amo kaj naturo

1984 - Kantu kaj lernu 3

1984 - La bufo





NOVAĴOJ PRI BEL

<u>VIZITOJ</u> - Lastatempe, vizitis nin la jenaj samideanoj: Carlos Augusto Guedes (31/10), prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la XXI Brazila E-Kongreso; Jannes Markus Mabesoone, el "Associação Pernambucana de Esperanto" (03/11) kaj Nelson Pereira de Souza, la nova Prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto (12/11). Kun ĉiuj, ni havis okazon interŝanĝi ideojn pri la nuna stato de la movado en nia lando kaj plej efikaj manieroj por disvastigi nian lingvon.

DONACOJ AL BEL, EN NOVEMBRO - Ely Filgueira (RJ) Cr\$ 2.000; Lair Iotti Lara (RJ) Cr\$ 100.000; Jorge Monteiro O. da Silva (RJ) Cr\$ 50.000; Neusa Priscotin Mendes (SP) Cr\$ 1.260; Eros Braga Biscotto (MG) Cr\$ 18.612; J. Balbino Camargo (RJ) Cr\$ 5.000. Al ĉiuj, koran dankon!

LIVERITAJ DIPLOMOJ, EN NOVEMBRO - Supera Kurso: 01.

ALIĜOJ/ABONOJ, EN NOVEMBRO - UEA: 02.

ELDONITAJ DOKUMENTOJ, EN NOVEMBRO - Enspeznotoj: 67; Rembursaj enspeznotoj: 15; Fakturoj: 04; Leteroj: 51.

EN NOVEMBRO, NIA MEMBRARO EN 84 JAM SUPERAS, EN ĈIUJ KATEGORIOJ, LA CIFEROJN DE 1983!

| | MC | N. 7 | | | | |
|--------------|-----|------------|------------|-----|------------|------------------|
| • | M-S | <u>M-1</u> | <u>M-2</u> | D-M | <u>B-M</u> | Entute |
| Gis 31/10/84 | 284 | 146 | 24 | 32 | 04 | 489 |
| En novembro | _06 | _ | _ | 01 | - | |
| Ĝis 30/11/84 | 290 | 146 | 24 | 33 | 04 | $\frac{07}{496}$ |
| Gis 31/12/83 | 288 | 135 | 23 | 30 | 02 | |
| | | | | | 02 | 478 |

NOVAJ TITOLOJ DISPONEBLAJ EN LA LIBROSERVO DE BEL - La prezoj aperas en internaciaj respondkuponoj. Pri la valoro de unu irk,oni informiĝu ĉe iu ajn Poŝtoficejo. La libroj estos ekspeditaj al la mendontoj per Poŝta Remburso:

- METODIKO EN LA PRAKTIKO, Red. Zs.Barcsay, Eld. Esperanto-Centro Paderborn kaj Hungara E-Asocio, Paderborn/Budapest, 1982, 122p. Praktika gvidilo por esperanto-instruistoj: 10,8 irk.
- OFICIALA SITUACIO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO EN LA MONDO, Komp. G. Pirlot, Costende, 1983, 17p. 2 irk.
- TRIDEK ROLULOJ, de Stefan MacGill, Eld. TEJO, 1981, 72p. Kvin skeĉoj kun ekzercoj: 5,5 irk.
- PRI LA VARMO, de M. Tuma, 215p. La fundamentaj konsideroj de la scienco pri la varmo: 5,2 irk.
- KIUJ SEMAS PLORANTE, de É. Tófalvi & O. Knichal, Eld. UEA, Rotterdam, 1984, 108p. Originala romano: 10,2 irk.
- INTERNACIA KOMPUTADO 83, red. Broczkó Péter, Eld. Hungara E-Asocio, Budapest, 64p. Fakaj artikoloj pri komputado: 5,2 irk.

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO/MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO/ MALLONGE ... PRI LA BRAZIL

XXI BRAZILA E-KONGRESO - Jam estis organizita la Loka Kongresa Komitato de la XXI Brazila E-Kongreso, kiu okazos en Belo Horizonte, MG, de la 17-a ĝis la 21-a de julio/1985: Carlos Augusto Guedes (Prezidanto), Marcus Túlio de Almeida Flores (Vic-Prezidanto), Dalmo Soares Arantes (Unua Kasisto), Onézimo Costa e Faria (Dua Kasisto), Ana Lúcia dos Santos Crespo (Unua Sekretario) kaj Alberto Luiz Minardi Chueiri (Dua Sekretario). La adreso de LKK estas: Rua Guajajaras, 410, sala 809, 30.000-BELO HORIZONTE, MG.

ESPERANTO-FAKO STARIGITA ĈE "UNIÃO DAS SOCIEDADES ESPÍRITAS DO RIO DE JANEIRO - Laŭ estrar-decido de la 23-a de junio 84, estis starigita esperanto-fako ĉe "União das Sociedades Espíritas do Rio de Janeiro", kies respondeculoj estas S-anoj Givanildo R.Costa kaj Paulo Andrade dos Santos.

TRADUKI EL LA HISPANA AL ESPERANTO - Ĉu vi kapablas? Do, kontaktu S-anon Paulo Amorim Cardo-so (Caixa Postal, 1221, 60.000-FORTALEZA, Ceara), ĉar eble vi gajnos monon (sed, ne multan!) pro via traduklaboro.

"O GLOBO" PRI ESPERANTO - Tiu prestiĝa ĉiutaga ĵurnalo, eldonata en Rio de Janeiro, publikigis la ĉi-suban novaĵon pri E-o, la l-an de decembro, en la multe legata rubriko de S-ro Ibrahim Sued. Tio okazis danke al la regula sendado de E-o Noticias, kiun BEL faras al centoj da gazetoj tra la tuta Brazilo, ĉiumonate.

Jorge Amado em 46 línguas inclusive em esperanto

Um dos primeiros exemplares de "Tocaia Grande: A Face Obscura", de Jorge Amado, já está circulando nos States. Foi levado por Anthony Motley, Subsecretário para Assuntos Latino-Americanos, que recebeu o exemplar quando de sua recente passagem pelo Brasil. Aliás, por falar no ilustre imortal baiano,

um de seus livros, "A morte de Quincas Berro d'Água", acaba de ser vertido para o esperanto. Com isso, Amado já pode ser lido em 46 línguas.



AL CIUJ SAMIDEANOJ, NI DEZIRAS ĜOJAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVAN JARON! ***************